

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO



*Publ. de la A.E.A. (Nia Kanto La Batou 1900)
Flandra Esperantista (Grupo
Ejo * Breughel *
Rue. Jacquemans, 37, Brussel (Belg.)*

Officieel Orgaan
van den

Vlaamschen Esperantisten - Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque	Fr. 55,— bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,— »
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,— »
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,— »
Ŝi — H. Rider Haggard	29,— »
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,— »
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,— »
Luno de Izrael	29,— »
La Dormanto Vekiĝas	29,— »
Pallietier — F. Timmermans	28,— »
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,— »
La Homaj rasoj de la Mondo	24,— »
Kudlago, la malgranda eskimo	5,— »
Literatura Mondo (Jarabono), 6 n-j.	54,— »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	18,— »
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,— »
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,— »
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,— »
Examenopgaven	10,— »
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
La Verbo en Esperanto	10,50 »
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50 »
Schidlof Zakwoordenboek	25,— bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,— bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,— bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,— broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5.— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:

A. Pittoors
Ten Eeckhovelei, 125
Deurne-Noord
Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer
P. van Humbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj

Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.

Eksterlando: 6 belgoj

Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

Esperanto en Flandrujo

Antaŭ proksimume ok jaroj Flandra Ligo Esperantista starigis. Tiutempe, okaze de lingvaj incidentoj dum la tutlanda kongreso en Gent, la Flandraj Esperantistoj forskuis la gvidadon de rasfremduloj kaj decidis laŭiri sian propran vojon.

Ekde la komenco, F. L. E. havis la avantaĝon nombri en siaj rangoj multe da junaj entuziasmoj. Se por la nova asocio la cirkonstancoj ne ĉiam estis rozkoloraj, la espero kaj la bonhumoro ne ĉesis regi. Kontraŭagoj, de laŭnome « oficialaj instancoj », ne povis haltigi la daŭran progresadon.

Pasintjare, modesta pruvo por organizi Ĉe-kursojn havigis utilajn spertojn. Nunjare, la ligestraro pli grandskale organizis tiajn kursojn kaj tiucele dungis kvin eksterlandajn kaj profesiajn Ĉe-instruistojn kiuj en dekoj da lokoj sukcese laboras por nia ligo.

La unuaj rezultatoj de nia intensa propagando montriĝas: novaj sekcioj fondiĝis en Arendonk, Blankenberge, Brugge, Diksmuide, Tienen, Vichte, Vilvoorde, Woumen kaj Zaventem. Aliaj estas en preparo en pluraj lokoj.

Necesas, ke en Flandrujo starigu densa reto da sekcioj kiuj, en konstanta kunlaboro kun la ligestraro, klopodu por la Esperantistigo de nia lando. La cirkonstancoj montriĝas favoraj al nia movado: la gazetaro favoras al ni, la regiona radio-stacio el Kortrijk regule propagandas por nia ligo, ekde 1938 la bulteno de la potenca Flandra Turista Ligo ree publikigos Esperanto-kurson; aliflanke la administraj servoj de F. L. E. nun bone funkcias, la kursa centro modele laboras, la kontakto de la ligestraro kun la sekcioj kaj reprezentantoj estas reguligita kaj la Flandra Esperanto-Instituto bone servas.

Ĉiu streĉu sian forton kaj uzu surloke, laŭ maksimuma ebleco, la favorajn cirkonstancojn; sed la rezultojn de niaj klopodoj ni kunigu por la plifortigo de Flandra Ligo. Ni ne malatentu, ke la nacia re-vekiĝo de Flandrujo favorege influas nian movadon. Ĉiu Flandra Esperantisto enviciĝu en Flandra Ligo kiu laboras

PER ESPERANTO POR FLANDRUJO !

G. D.

145

Esperanto in de Praktijk.

DENEMARKEN

Bij ministerieel besluit werd de invoering van Esperanto in de scholen voor technisch onderwijs toegelaten.

ENGELAND

Te Scheffield dragen de trambedienden-Esperantisten, tijdens de diensturen, de Esperanto-ster. De Scheffieldsche Esperanto-club van trampersoneel telt 200 leden.

FRANKRIJK

De algemeene bestuurder van het technisch onderwijs in Frankrijk, heeft toelating verleend tot het inrichten van faculteiten Esperanto-leergangen in de technische scholen.

HONGARIE

De schrijfster Jolán Földes behaalde met haar werk « De Straat der Visschende Kat » den hoofdprijs (500.000 fr.) in de groote internationale romanprijskamp uitgeschreven door de Engelsche firma Pinker. Binnenkort verschijnt dit belangrijk werk in Esperanto samen met 11 andere vertalingen.

ITALIE

Door de afdeeling voor toerisme van het Italiaansche ministerie voor pers en propaganda, werd een prijskamp uitgeschreven onder de luisteraars der « Italiaansche Toeristische Kronijken » voor de Nederlandsche, Fransche, Engelsche en Duitsche talen en ook voor Esperanto. De premiën bestaan uit vijf reisbiljetten eerste klas van aan de grens tot Napels en vijf biljetten tweede klas tot Rome, plus tien dagen kosteloos verblijf in eerste rang hotels.

JAPAN

In Januari j. l. werd de Japansche Wetenschappelijke Esperanto Associatie gesticht. In het eerste nummer van haar tijdschrift « Scienco » (Wetenschap) vinden we een eerste ledenlijst met 450 namen waarin Dr. Inoue-Zinkiti, rector der keizerlijke universiteit Tôhoku, als algemeen directeur staat vermeld. Tot nog toe verschenen een honderdtal wetenschappelijke werken van Japansche geleerden in Esperanto.

OOSTENRIJK

Door de handelsbeurs van Weenen werd een prachtig prospectus in driekleurendruk uitgegeven met tekst in Esperanto.

POLEN

De voorzitter der Poolsche Republiek, Prof. Dr. Moscicki, heeft zijne hooge bescherming verleend aan het 29-ste Wereldkongres van Esperanto, dat dezen Zomer te Warschau gehouden wordt. Tot het bescherm-comité zijn ook al de ministers en vele hoogwaardigheidsbekleeders toegetroten.

SOVJET-RUSLAND

Door de Kinematografische Vereeniging voor Onderwijs en Wetenschap van Leningrad werd een Esperanto-afdeeling opgericht met het doel een internationaal onderzoek in te stellen over de kinematografie in het onderwijs. Voor inlichtingen en vragenlijsten zich wenden tot : Poštkesto 532 Leningrad 3 Sovjet-Unio.

Flandra Ligo Esperantista

Kunveno en Brussel, la 14 Marto 1937.

Ceestas : la sekcioj Aalst, Antwerpen, Brussel, Kortrijk, Leuven, Mechelen, Oostende Oudenaarde Tienen Vilvoorde kaj la delegitoj el Gent, Ronse, Mortsel.

Ne estas reprezentataj : la sekcioj Lichtervelde, Vichte kaj Zaventem. Vichte sin senkulpigis.

1. — La kunveno aprobas la raporton de la kunsido de 13-12-1936. La prezidanto rimarkigas ke la nombro de 3 Ĉseh-instruistoj menciata en tiu raporto jam kreskis ĝis 5; en ĝi ni alvokis por 100 novaj abonantoj sed ni jam varbis 150 kaj ankoraŭ pluaj estas anoncataj !

2. — Dum la lasta monato aliĝis al la Ligo 8 novaj sekcioj; el ili sendis reprezentanton : Vilvoorde (S-ano Bogaerts), Oudenaarde (S-ano D'Haeyer), ambaŭ estas aplaŭde bonvenigitaj. Vichte sin senkulpigis, ĉar ĉiuj gemembroj estas mobilizitaj hodiaŭ por propagandi en la ĉirkaŭaj vilaĝoj.

3. — La prezidanto prezentas la novan ĉefredaktron de Flandra Esperantisto, S-ano Achiel Pittoors el Deurne.

La vic-prezidanto klarigas la taskon de la redaktoro kaj esprimas la esperon ke la nova funkciulo akceptos la postenon por kelka tempo kaj almenaŭ ĝis 1938, jaro ĝis kiam daŭros la kontrakto kun la presejo.

4. — S-ano Cnops el Leuven, plendas ke la gekongresanoj ne sufiĉe rapide aliĝas ; ĉio tamen estas enorda, al la provizora programo kiu aperis en F. E. ne okazis notindaj ŝanĝoj. De la kongresmarkoj, la unua eldono estas elĉerpita, nova aperos baldaŭ.

5-7. — Punktoj 5 kaj 7 estas pridiskutitaj samtempe, ĉar ili grandparte rilatas al samaj aferoj.

La prezidanto rememorigas ke antaŭ kelka tempo okazis ŝanĝo en la administrado de la Ligo. La vic-prezidanto kontrolas nun la organizan parton. La propagandon kaj la Ĉseh-kursojn prizorgas la prezidanto; li dankas la kunhelpantojn de la kursoj, unue F-ino De Graeve en Oostende kaj Blankenberge, S-ano D'Haeyer en Oudenaarde kaj Anzegem, F-ino De Cock kaj Geeroms en Aalst. Post kelkaj tagoj malfermiĝos kursoj en Aalst, Turnhout, Mol, Gent, Geel, Opwijk, Vichte, Kortrijk, Anzegem, Wetteren, Wevelgem, Zwevegem, Wervik. Proveciono en la malgranda vilaĝo Handzame nombris 46 da geaŭskultantoj, malgraŭ terure malfavora vetero.

S-ano De Keyzer, kasisto, skizas la situacion laŭ financa konsidero. Depost la kunveno de 27 Septembro 1936, la gajno estas : 3 sekcioj, 111 liganaj, 98 abonantoj. La novajn liganajn precipe havigis al ni la novaj sekcioj kaj ankaŭ kelkaj malnovaj sekcioj kies membronombro kreskis. Sekcioj estas en preparo kaj promesis aliĝon en : Aarschot, Arendonk, Blankenberge, Brugge, Diksmuide, Vilvoorde, Woumen. Ni havas la konvinkon ke en Leuven dum la ĝenerala jarkunveno de Flandra Ligo, ni povos anonci 20 sekciojn, 400 liganajn kaj saman nombron da abonantoj. Tio estu la unua paŝo al nia celo : 1000 anoj kaj abonantoj en la jaro 1939 dum kiu ni festos nian 40-jaran ekziston.

La prezidanto rimarkigas al la kasisto ke tio ne estu la programo por 1939, sed jam por 1938 necesas tion atingi ! Ĉi tiun vintron okazis proksimume 40 kursoj; dum la venonta sezono samtempe malfermiĝos kursoj en 40 ĝis 50 lokoj, post 4 monatoj sama nombro komencos aliloke...

La vic-prezidanto insistas pri la graveco de la varbkapablo de la Cseh-instruistoj; absolute ne sufiĉas ke ili bonege instruu, ili precipe ne perdu el vido ke tasko ilia ankaŭ estas varbado de liganaj kaj abonantoj. La kursoj estas fruktedonaj nur laŭ la procento da gelernantoj kiun ili sukcesis varbi por la centra organizo.

Ankaŭ necesas admoni la sekciojn ĉar ili ne sufiĉe rapide aligas la novajn membrojn; por ebligi aliĝon dum la jaro estas konsentita duonan kotizon por januaro-junio; nur la sekcio Kortrijk priatentis tion, pagante.

Al la sekcioj kaj al la reprezentantoj estis sendata demandaro koncerne ilia aktiveco; ŝajnas ke multaj ne konscias pri la graveco de tiuj demandoj; necesas zorge respondi al ĉio, ne resendu blankan paperon, eventuale respondu per « nenio » se vi nenion atingis.

Ekde kelkaj monatoj aperas en Flandra Esperantisto nacilingva rubriko pri la progresoj de Esperanto; ankaŭ de tio oni ne faras sufiĉe grandan uzon; pripensinde estas ke la vic-prezidanto ricevis pli grandan kvanton da nederlandaj ĵurnaloj enhavantaj tiujn komunikojn ol da flandraj.

La prezidanto diras ke estas mensogo ke Flandro ne havas intereson por Esperanto; aliaj landoj ne estas pli kleraj. Unualoke kulpas la propagandistoj kiuj ne sufiĉe eluzas ĉiujn eblecojn. La faktoj montras ke la movado progresas tie kie oni propagandas, ĉiu agu en sia regiono!

6. — La punkto ekzamena komisiono estas metita sur la tagordo sekve al demando de la sekcio Antwerpen.

Al S-ano Van Durme la prezidanto respondas ke la estraro jam sufiĉe longe antaŭvidas starigon de speciala memstara fako, kun aparta kaso kaj aparta estraro, kiu sin okupus pri la ekzamenoj.

Jam pli frue Flandra Esperanto-Instituto organizis ekzamenojn kaj donis atestojn, sed dum la kongreso en Gent, la ligestraro de- mandis ne plu fari tion ĉar tiaj atestoj estas sen oficiala valoro. La intenco estas starigi sekcion de geinstruistoj kiu sin okupus pri la ekzamenoj kaj klopodus atingi oficialigon.

Post interveno de S-ano Verheyden kiu atentigas pri la psikologia valoro de atesto eĉ neoficiala, estas interkonsentite ke la Instituto povas aranĝi ekzamenojn kiam sufiĉe granda nombro da interesuloj esprimas deziron je tio.

5. — Diversaĵoj.

S-ano De Boes rimarkigas ke ne sufiĉan kvanton da materialo li ricevis por la migranta ekspozicio, kiu imponos nur per prezentado de kompletaj fakoj diversaj.

Estis decidite ke el la libroj ricevitaj por recenzo, unu ekzemplero enirus la migrantan bibliotekon; ni nun rimarkas ke tio ne okazas. Estas konfirmata la decido ke je ricevo de 2 recenzekzempleroj, unu apartenas al la recenzisto kaj unu al la migranta biblioteko.

S-ano Verheyden informas ke la grava tagĵurnalo « De Dag »

NENIU LINGVO
sen literaturo. Plej trafe
prezentas al vi nian lite-
raturon la revuo

LITERATURA MONDO
Luksa aspekto, ilustrita.
Abono : 65 fr.

LINGVO - LIBRO
informas vin pri ĉiu okazo
en nia literaturo. Abonu
ĝin kune kun viaj amikoj.
Abonprezo (tri ekz. kune)
8 fr.

Abonojn akceptas kaj spe-
cimenojn sendas :

Flandra Esperanto-Instituto

Magdalenast., 29, Kortrijk (P.K. 326851)



*Al la maskotago
De l' korespondanto
Sendi La Mo-libron
Sub verdimura banto:
Fagaco-Malervare spavora:
Dnaco-Kara kaj malkovra*

konsentas represi artikolojn sed ili nepre devas esti ilustritaj. Samideanoj posedantaj fotojn kiuj rilatas la esperantistan movadon bonvole pruntedonu ilin. S-ano Mortelmans, prizorganto de la rubriko en « De Dag », estos proviziata je speciala leterpapero de la gazetara servo.

S-ano Verheyden ankaŭ raportas pri la traktadoj kiujn li havis kun S-ro Craeybeekx, senatano, kiu konsentus verki leĝproponon por enkonduki Esperanton kiel duan lingvon en la flandraj lernejoj, sed li demandas ke oni havigu al li dokumentojn pri la agado farita tiusece en la eksterlando.

S-ino Sindhwad proponas ke Flandra Esperantisto enhavu paĝon por komencantoj. La estraro akceptas sed necesas trovi spertan redaktanton. S-ino Sindhwad konsentas eventuale prizorgi tiun paĝon.

S-ano Broodcorens protestas kontraŭ kelkaj frazoj aperintaj en la januara numero, paĝoj 106 kaj 107.

La prezidanto diras ke por diversaj sekcioj estas malfacile starigi interesajn vesperojn. Unu el la rimedoj estas : ni havu novan funkciulon, grupkonsilanton, kiu donus ideojn al la grupoj kiuj ne scias kion fari. La prezidanto ofertas la postenon al S-ano Cortvriendt sed li ne akceptas.

S-ano Pittoors, ĉefredaktoro, demandas se li devas akcepti tekston por korespondanoncetoj en Flandra Esperantisto. La decido estas nea. Nur estu akceptataj anoncetoj el la eksterlando.

Laŭ propono de S-ano Cortvriendt, la kunveno aprobas ke personoj kiuj reprezentas Flandran Ligon, ne povas akcepti similan postenon por alia asocio. Ne eble estas servi 2 sinjoroj; ni konstatas ke en lokoj kie tio okazas ni malprogresas. La koncernaj personoj devos elekti por kiu ili deziras labori.

Post aranĝo de kelkaj flankaj aferoj, la kunsido finiĝis je la 1 1/4 horo.

LA SEKRETARIO.

8a Flandra Kongreso de Esperanto de la 15a Ĝis la 17a de Majo

TRIA KOMUNIKO



Monsendojn oni bonvolu fari je P. C. 196.161 je nomo de S-ro M. Dekesel, Bondgenootenlaan, 177, LEUVEN. Korespondadoj oni direktu al la kongressekretario : Lode Cnops, Broekstraat, 21, HEVERLEE.

Dum la ligkunveno en kinejo « Lovanium », Dimanĉon proksimume je la 12-a, estos montrataj la filmoj de la antaŭaj kongresoj.

Por la loterio dum la Esperanta Balo Dimanĉvespere, la O. K. insiste petas ĉiujn alporti iun premion. Precipe al la sinjorinoj kaj fraŭlinoj ni petas esti tiel afable fari iun manlaboraĵon.

Ni ĉiam danke ricevos fasadflagojn kaj streĉtukojn.

Ankoraŭ kelkaj centoj da glumarkoj restas. Ili estas trikoloraj kaj kostas 6 fr. po 100.

Ni ĉi-tiun jaron ne aldonas aliĝilojn al Flandra Esperantisto ĉar ni jam sendis afiŝojn kaj aliĝilojn al la grupoj. Se eble estas iu grupo aŭ delegito kiu ne jam ricevis, oni bonvolu peti la necesan kvanton de la sekretario. Se iu povas uzi pli da afiŝoj al la ricevita kvanto, li ankaŭ bonvolu peti pluajn.

NE FORGESU KE PENTEKOSTO ESTAS FRUA ĈI-JARE...
ENSKRIBU TUJ POR LA LOGADO.

La sep Mirindaĵoj..... Lovenaj :

Ĉu vi konas la sep mirindaĵojn de la mondo ?

Eble ne, sed certe estas ke vi jam aŭdis pri ili. Vi tamen scias ke ili ekzistas aŭ almenaŭ ekzistis...

Sed, ni vetas, se vi ne estas Lovenano, ke vi ne aŭdis pri, kaj certe ne vidis la Sep Mirindaĵojn de Loveno.

Sed tamen ili ekzistis... Nuntempe ankoraŭ restas 4 el la 7...

Vi miras ke Loveno havis sep mirindaĵojn ?

Aŭskultu nur :

1. — La homoj promenantaj sub la arboradikoj.
2. — La vivantoj, kiuj pasas sub la mortintoj.
3. — La turo malpli alta ol la preĝejo.
4. — La akvo, kiu fluas kontraŭflue.
5. — La turo sen najloj.
6. — La altaro kiu staras ekster la preĝejo.
7. — La sonorilo, kiu pendas ekster la turo.

Vi sendube demandas klarigojn pri tiuj veraj eksterordinaraj mirindaĵoj; ĉar ordinare nur la vermoj pasas sub la arboradikoj; la vivantoj eĉ ne ŝatas esti kun la mortintoj, ankoraŭ malpli esti sub ili...; ordinare la turo sin trovas sur la preĝejo, la akvo fluas en saman direkton; turo sen najloj nur ekzistas eble en nia moderna

betona periodo; altaroj staras ĉiam en la preĝejo kaj la sonorilo certe ne pendas ekster la turo. Nur je Pasko ili vojaĝas al Romo, sed tio ja estas ordinara mondkonata fakto.

Malfeliĉe, niaj mirindaĵoj restas nur mirindaĵoj, tiel longtempe, kiel vi ne vidas ilin, aŭ almenaŭ ĝis kiam oni klare klarigas la tro... ordinarajn aferojn. Ĉar, se eĉ vi estus vidanta la sonorilon ekster la turo, vi certe ne kredus, kvankam la legendo atestas ĝin, ke estas la diablo en propra persono kiu fiksas ĝin tiamaniere... ĉar ĝi ne estas baptata! Tiu mirindaĵo ĉiam estas videbla ĉe la turo de la sankta Jakoba preĝejo.

La altaro ekster la preĝejo estas nur la tre bela barokfasado de la Sta Miĥaela preĝejo, farita laŭ desegnaĵoj de Rubens, kaj kiu donas la aspekton de altaro.

La turo sen najloj estas tiu de la Sankta Gertruda preĝejo. La tura pinto estas travidebla, ne havas lignaĵojn, nek ardezojn, kaj do ne bezonis najlojn por fiksi iun plafonon. La popolo tamen pretendas ke la koboldoj konstruis ĝin.

La Akvo antaŭe nur ŝajne kontraŭflue fluis pro la turniĝo de la Dejlo-rivero, tamen ne plu ekzistas depost la kanalizado de tiu parto de la rivero.

La turo malpli alta ol la preĝejo estas nur la turo de antaŭa preĝejo, kiu restis flanke de nova pli alta preĝejo.

La vivantoj irantaj sub la mortintoj kaj sub la arboradikoj nur okazis sekve de la faktoj ke 1^o nobelaj mortintoj estis enterigitaj en la malnova Sta Miĥaela preĝejo, konstruita super la Tienena Pordego, kaj 2^o ke arboj kreskis sur la ramparoj, malsupren kiu la homoj pasis tra la Brusela pordego ...

Do, kiel vi tro bone komprenas, karaj gelegantoj, estus pli konvena kaj pli interesa laŭdi la belajn folklorajn anekdotojn anstataŭ klarigi la tro ĉiutagan realecon de tiuj ŝajnaj mirindaĵoj.

Pol VAN DER POEL.

Dr Nico Van Suchtelen en het Esperanto

(Fragment uit het merkwaardige boek « Tat Tvam Asi », aantekeningen van een kristalkijker).

Wandeling met Tine, Lydia, Bourdin en Borinsky naar de Romeinsche Burcht. Gesprek over wereldtalen. Zij voelden allen veel voor een taal, maar dan geen « kunstmatige », geen Esperanto of zoiets.

Ja, wat dan ?

De mooiste « natuurlijke » taal.

« Juist, het Fransch », zei Bourdin.

« Gelukkig dat Heer Oberlehrer er niet is om het monopolie op te eischen voor het Duitsch », merkte Borinsky op.

Ik had lust den goeden Bourdin een beetje te plagen met zijn zonderlinge opvattingen van « mooi » en « natuurlijk ».

« Lees eens een gedicht in het Provençaalsch, of de toespraak van Lodewijk den Duitscher die mij vanmiddag net onder de oogen kwam. Die hield hij te Straatsburg, anno achthonderd-en-zooveel in

de lingua romana. Wat een barbaarsch verbasterd Latijn! En het moderne Fransch is tenslotte niets anders dan diezelfde talenverhaspeling, alleen in nog sterker graad ».

« Doet er niet toe », protesteerde Bourdin, « die verhaspeling is in elk geval natuurlijk en mooi, uit de ziel van het volk opgebloeid! »

« En wat zeg je van de brabbeltaaltjes, het handelsbargoensch, samengeflanst uit verminkte woorden van een dozijn talen, zooals dat in sommige streken van Zuid-Europa, of in Centraal-Afrika, of in de Chineesche havens geschapen wordt door je hooger geroemde spraakmakende gemeente? Ook dat koeterwaalsch is « natuurlijk opgebloeid ». Misschien heel mooi, maar het klinkt gekker dan de kunstmatige talenverhaspeling van Zamenhof. »

« Dus je wilt beweren dat er geen mooie talen bestaan? En het Grieksch dan? »

« Vraag dat een leek en niet een Homerusmaniak als ik. Iedere eerlijke leek vindt het een raar koeterwaalsch en dien indruk maakt elke willekeurige taal aan wier klank men niet gewend is. Overigens is iedere taal mooi, namelijk even mooi als iedere andere. Een waarachtig taalkunstenaar weet iedere taal mooi te maken door doeltreffende samenwerking van klank en zinstructuur. Fransch of Nederlandsch kunnen even mooi zijn als Grieksch of Groenlandsch of Esperanto. Racine's of Verlaine's taal is mooier dan die van een of anderen Griekschen poëtaaster, en Sophokles spreekt schooner dan een Fransche of Hollandsche rijmelaar. En waarom zou een Zamenhof of ander taalgeleerde en kunstenaar niet op grond van zijn kennis en zijn inzicht een veel mooier, eenvoudiger en logischer taal kunnen construeren dan het hoogst onbeholpen en omslachtige babylonische gebrabbel waarmee de moderne mensch wanhopig poogt zich eenigzins verstaanbaar te maken? Heb je wel eens een internationaal kongres bijgewoond, waar ieder spreker maar door een tiende der aanwezigen kan worden gevolgd, niet eens verstaan? Hoe hopeloos onvruchtbaar en vervelend zijn de discussies, die onvermijdelijk afzakken tot de algemeene banaliteiten. Een wereldtaal is een noodzakelijke voorwaarde voor de toekomst eener werkelijk menschelijke samenleving. »

« Toekomstmuziek! »

« Maar er komt immers een toekomst. Van honderden, van duizenden eeuwen! Volgens je eigen theorie! Denk je dan werkelijk dat er in de 250 duizendste eeuw nog Fransch of Engelsch of Chineesch zal worden gesproken? Dan zal er toch zeker allang één enkele wereldtaal bestaan, in vergeten eeuwen « kunstmatig » gevormd uit Germaansch-Romaansch en vele andere oertalen, maar sindsdien, nadat de literatuur dier oertalen volkomen teloor is gegaan, door eigen leven tot een geheel « natuurlijke » menscheids-taal ontwikkeld. LAAT DAAROM DE JEUGD ESPERANTO LEEREN, EEN TAAL DIE NET BEGINT TE LEVEN EN WAARVAN NOG ALLES TE MAKEN IS, IN PLAATS VAN GRIEKSCH EN LATIJN DIE MORSDOOD ZIJN. »

Dit vooruitzicht scheen Lydia eenigszins te verschrikken.

« Ik vind het zoo'n verlamdende gedachte », zeide ze, « dat alles moet vergaan, dat van al ons denken en doen geen enkel spoor zal overblijven. Dante en Shelley vergeten!... »

« Of nog erger : vertaald in toekomst-koeterwaalsch », viel Bourdin in.

« Maar Lydia, er vergaat juist niets; alles wordt overgenomen en verwerkt in iets anders... Alleen de geest die de dingen schept is onvergankelijk, maar dat de dingen zelf verdwijnen in voortdurende metamorphose is heelemaal niet te betreuren. Bourdin vergist zich als hij denkt dat Dante of Shelley niet « mooi » te vertalen zouden zijn in toekomst-koeterwaalsch, maar als ze niet daarin vertaald werden zouden er zeker tegen dien tijd genoeg Dantes en Shelleys opstaan om direkt in de wereldtaal te schrijven, en minstens even mooi als hun voorgangers het deden in het Italiaansch of Engelsch.

Federacio de Geinstruistoj Esperantistaj

La Esperanta movado forte kreskas en Flandrujo, t.e. per la laboro de la Flandra Ligo, per la organizo de la Cseh-kursoj, multaj personoj esperantiĝas, la nombro de nia anaro rapide pligrandiĝas, la ideo de la internacia lingvo penetras en ĉiujn mediojn. Sed, tiu laboro, mi konsideras ĝin nur kiel ĝenerala laboro; ĝi estas absolute necesa, sed ne sufiĉas !

En la vivo la homoj estas dividitaj en multaj kategorioj, laŭ la metio, kaj aliaj vidpunktoj. Ĉiu kategorio havas apartajn postulojn, apartajn bezonojn kaj apartajn interesojn. Por atingi la finvenkon ni nepre devas prilabori ĉiujn kategoriojn aparte.

Ni do bezonas, krom intensa ĝenerala laboro, ankaŭ intensan specialan propagandon. La ĝenerala propagando kaj organizo estas kaj restos la propra laboro de la ligo; por la speciala propagando ni bezonas specialajn organizojn kiuj havas ĉiujn necesajn kvalitojn por tiu propagando.

Harmonia laboro tamen postulas ke tiuj specialaj organizoj ne estus memstaraj, sed kunlaboru kun la ĝenerala organizo, t. e. la ligo.

Tial ni fondos, laŭ la necesoj kaj laŭ la eblecoj, en la ligo, kiel partoj de la ligo, la diversajn organizojn aŭ fakojn kiujn la movado bezonas. Pro diversaj kialoj la unua fakorganizado estu : *la federacio de la geinstruistoj esperantistaj*. Dum nia kongreso en Loveno okazos speciala kunveno por la geinstruistoj, en kiu ni fondos la geinstruist-federacion, indikos la ĉefajn celojn de la organizo, kaj planos la irotan vojon. Ĉiuj esperantistaj geinstruistoj nepre ĉeestu tiun kunvenon; ne nur kiel simplaj aŭskultantoj, sed kun la firma volo vige kunlabori por atingi la finan celon de nia movado : la oficialan rekonon de Esperanto.

GEINSTRUISTOJ, SCIU, SEN VI, TIO NENIAM OKAZOS !

La Prezidanto.

ESPERANTO EN LA LERNEJON!!

Printempa Legendo

Ĉi tiun nokton renaskiĝas la printempo
Baptata estas ĝi en blua lum' de lun'.
Venuso, amdiin' kaj baptpatrino kun
La patro Jupiter' atestas pri l' entempo !

Kaj super nia revdormanta hemisfero
Plengorge kiel orgenlud' trilonas kant'
Majesta, reĝa de la najtingala band'
Dum mil steletoj flagras en ĉiela sfero.

Florado, Vivo, Am' Triobla unueco
Kreata, el printemp', subite je ekest' :
Tri nimfoj diafanaj, pretaj por la fest'
Dancantaj en subtila, luna lumblueco.

Sed post la pli intima nokt-ceremonio
Salmante trile, tondre la bordeta-ĥor'
Salutas la tagiĝon : lumo, fajro, or' !
La sun' leviĝas kiel dio el orgio...

Florad' elburĝoniĝas florojn multkolorajn
Sur arboj, boskoj, en herbejoj, laŭ river'
Pro vivo ĉion krakas, krevas sur la ter'
Pri am' sonoras melodioj plen-maĝoraj.

Ja vivo, am', florado estas la printempo.
Per viv' al am', per am' al vivo kaj florad'
Ĉu ne florad' nur estas viv' kaj amkaskad'
Ni homoj, ebriiĝu per volupta tempo !

Pol VAN DER POEL.

La Izerturo en Diksmuide

Aliformigo de la kriptoj en sep grandaj ĉerkejoj

Dum la 18-a pilgrimado al la tomboj de la Izero, nunsomere, okazos ankaŭ la inaŭgurado de la nova, aliformigita kriptoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj la membroj de la komitato, inter kiuj S-roj. Prof. Daels, De Lantsheere, Pastro Vincke kaj Van Neste, monaĥo Callewaert, k.a. vizitis la turo. La laboroj jam tiel progresis ke ili povis konvinkiĝi pri la plibonigoj.

Niaj legantoj sendube rememoras la impresplenan ceremonion en la jaro 1932-a kiam la restaĵoj de sep flandraj mortintoj estis transportitaj de la militkampoj al la Izerturo, kie ili estis metitaj en la kriptojn. Ĉar tiu loko tamen ne estis aranĝita kiel enterigejo, oni metis la ĉerkojn provizore en la koridoro, ĝis kiam oni povus doni pli indan ripozlokon al ili. La kriptoj de la Izerturo, formita el la malsupra parto, sub la tri grandaj ŝtuparoj (pedestalo de la turo) entute ne estis antaŭvidita ek de la konstruo de la turo, nur poste.

kiam la turo preskaŭ estis finkonstruita, oni ekhavis tiun planon. Tio ankaŭ klarigas, kial la rondirado de la turo nur estas ebla je unu triono de la koridoro, dume la alia parto pro la malalteco tro ĝenis la vizitantojn.

Tial la veraj internaj ĉambroj (la samaj de la bloksistemo kiujn oni vidas ekstere, kaj sur kiuj troviĝas la vortoj « Neniĝo plu milito » ne estis alireblaj de la publiko, estante vera labirinto. Post la transporto de la sep Izersimboloj oni proponis aliformigi tiujn ĉambrojn, kunŝantaj je la interna flanko de la kriptoj, kaj aranĝi ilin kiel konvenaj ĉerkejoj. Tamen la altaj kostoj kaj por la konstruaĵo riskoplena entrepreno tre timigis la komitatanojn. La jaroj 1935-36a alportis plibonigon en la financa stato, kaj tial post multaj esploroj de teknika komitato oni decidis komenci la laboron. La 16-an de Novembro 1936-a aŭdiĝis la unuaj batoj. Komenciĝis la plej delikata laboro : tutaj apogpunktoj kaj fundamentoj devis malaperi aŭ esti rekonstruataj, ne difektante la fortecon de la konstruaĵo. Granda penado, kiu postulis multe da studado kaj antaŭzorgoj.

La aliformigo de la Kripto.

Jen la diversaj partoj de tiu laboro :

a) konstrui regulan okangulon anstataŭante la multangulon kun la ĝenaj apogpunktoj.

b) konstrui kvar grandajn kaj tri duoblajn ĉerkejojn, krome regulan en- kaj eliron por la supreniro de la turo.

c) pliprofundigi la koridoron, por ke oni senĝene povu pasi sub la laŭlarĝaj traboj, kiuj subtenas la eksterajn ŝtupojn de la monumento.

La efektivigo de tiu plano ebligas aranĝi la ĉerkejojn precize sub la statuoj, tiel ke la mortrestaĵo de la herooj iĝas kvazaŭ la fundamento de ilia bildego.

Plej singarde oni devis labori. Kvankam kelkaj apogpunktoj devis esti forlokigitaj, la turfundamento tamen ne malfortiĝis, kontraŭe fariĝis ankoraŭ pli forta.

Ankaŭ la pliprofundigo de la koridoro estis tre malfacila laboro, ĉar la kolonoj, kiuj troviĝis sur la fundamentoj ne plu taŭgis, oni estis devigata anstataŭi ilin per novaj.

La nomojn de la mortintoj, oni metos en la ekstera koridoro.

Per la fermigo de la fenestraj aperturoj oni akiras dekkvar grandajn tabulojn. La tomboŝtonoj troviĝantaj en la muroj estos metataj aliloke. La lifto, kiu antaŭe foriris de la unua etaĝo, nun funkcias de el la kriptoj mem. Oni forigos la antaŭan maŝinĉambron, kaj la maŝinojn oni metos en fermita, nevidebla ĉambro kiu neniigos la daŭran bruon. Specialan lumigadon oni pristudis, por ke regu bela harmonio inter epitafoj kaj koridoro, samtempe donante al la kriptoj solenan atmosferon.

Jam de nun oni estas konvinkita ke vizito al la nova kriptoj faros grandan impreson. En malmultaj vortoj Prof. Daels montris al ni kiel la idealo de Diksmuide kunigas ĉiujn Flandrojn en forta popolinterligado, bazita sur la granda ofero de niaj mortinaj flandraj fratoj por la unueco kaj grandeco de Flandrujo kaj ĝia popolo.

Tradukis Paŭlo Samyn (Roeselare).

Por komencantoj

INSTRUISTO AL SIAJ GELERNANTOJ

En la Nederlanda provinco Frislando, dum bela Septembra tago mi venis en la mondon kaj, vi ja povas supozi, mi ne kapablis diri al mia bonkora patrino « Bonan tagon! » ĉar mi ankoraŭ ne konis Esperanton, nek la Frisan lingvon. Cilastan mi lernis el patrina buŝo, do ĝi estas mia gepatra lingvo.

Kiam, antaŭ sep jaroj, mi vivis en Hilversum, mi konatiĝis kun la tre respektinda pioniro de Esperanto en Nederlando, S-ano Dreves Uitterdijk. Ĉi tiu, jam 70 jara, nobla homo diris al mi : « Mi amas du lingvojn, la tre malnovan Frisan kaj la plej modernan Esperanton ».

Kun danko mi memoras pri la unuaj lecionoj, kiujn instruis al mi tiu pioniro de Esperanto. Dank'al li mia vivo tute ŝangiĝis. Post la 20 leciona kurso mi komencis vojaĝi. Pri la utilo de Esperanto mi ne dubis sed pri la perfekteco — jes. Dum la vojaĝo mi konstatis tamen, ke nia internacia lingvo respondas al ĉiuj bezonoj de la vivo.

Tion mi rimarkis jam en Arnhem, kie okazis internacia Esperanto-kurso laŭ la rekta metodo de la fama pedagogo Andreo Cseh. En tiuj tagoj mi ne pensis, ke ankaŭ mi iam instruos laŭ tiu genia metodo.

Tra Belujo al Francujo. Tra tuta Francujo, jen la unua vojaĝo. Ne estas eble paroli pri la centoj da agrablaj renkontoj kun Esperantogeamikoj el la tuta mondo. Precipe en Parizo dum la universala kongreso.

En la plej suda, la plej suna parto de Francujo mi havis la grandan plezuron instrui nian lingvon al infanoj 5 ĝis 13 jaraj. Interesa kurso. Estis en malgranda vilaĝo sur 550 metrojn alta monto.

Post unu jaro mi reiris al Nederlando, kie, dum la vintro, mi instruis Esperanton en Frislando. En la printempo la norda poluso altiris min kaj baldaŭ mi estis en Danlando kaj Svedlando. Belaj landoj, kie loĝas multaj homoj kun verda koro.

Multajn kursojn mi gvidas tie; reiris al Francujo por tie kursgvidi, fari paroladojn kaj... kaj trovi « la feliĉon ».

Kune ni vojaĝis, kune ni instruis kaj propagandis Esperanton, kiu de tiu tempo estas nia familia lingvo. En Svedlando unue, poste denove en Francujo, kie mi gvidis kursojn kaj donis paroladojn en la norda regiono kaj nun — en Flandrujo!

Vere, kun ĝojo mi estas inter vi, Flandroj. Plezure mi konstatis, kiel rapide kaj facile vi lernas nian karan lingvon, kiu malfermas antaŭ vi pli vastan horizonton.

Kaj dank'al vi ankaŭ mi lernis; lernis kompreni la Flandran spiriton; komprenas nun, ke vi volas protekti vian lingvon kaj batalas por viaj rajtoj kaj libereco.

En tiu batalo uzu ankaŭ Esperanton, tiu paca rimedo, kiu povas alporti nur bonon al via popolo kaj al la tuta mondo.

S. STUIT,
Cseh-instruisto.

Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administrato aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

LA AVENTUROJ DE MARTENO DRAKE, eldonita de « The Esperanto Publishing Co. Ltd. El la angla lingvo de G. Norway, esperantigis Walter SEVERN.

Kun granda intereso ni tralegis ĉi-tiun libron. La enhavo plena je aventuroj — arbara vivo — indianoj k. t. p. certe tre interesigas la junajn Esperantistojn. Pri la traduko ni devas konfesi ke ĝi estas tre klara, kvankam la tradukinto penis eviti el ĝi ĉiujn tipajn anglajn dirajojn. La komencanton eble mirigos kelkaj strangaj, tamen bone kompreneblaj vortoj. Ekzemple en la frazo « Ĉu vi intencas informi pri la *kieo* de nia patro ? » kaj anstataŭ « *iriĝis* » la tradukinto tutsimple uzas « *ĝisiri* ». Aro da nomoj de arboj, plantaĵoj, birdoj k. t. p. pliinterestigas la libron. Ĉi-ĉio certe, kiel ni jam diris, tre interesos la junajn aventuremajn kaj lernemajn esperantistojn. Nur maloftaj prezeraroj troviĝas en la bela eldonita libro. kiu vere meritas lokon en ĉiu esperantista biblioteko.

H.V.D.

Diversaĵoj

La Komitato de la universala kongreso en Wien, eldonis broŝuron 64 paĝan, enhavantan la tekston de la paroladoj okazintaj dum la somera universitato, dum la internacia konferenco de la instruistoj kaj dum la internacia konferenco de la virinoj.

Ĝi estas havebla ĉe la Intern. Esperanto-Muzeo, Neue Burg, Wien I., kontraŭ alsendo de 5 intern. respondkuponoj.

Je sama adreso estas ankaŭ havebla vortareto germana-esperanto, de D-ro Pfeffer, similspeca al la konataj « ŝlosiloj », po 5 ekz. por 1 respondkupono.

Grave :

Bonvole skribu tuj ilustritan poŝtkarton mendante senpage belan memorigan poŝtmarkon de la brazila poŝto kun teksto en Esperanto, ĉar via respondo helpos nian propagandon kaj la p. m. helpos la vian.

Adresu al S-ro Ismael Gomes Braga, Rua José Vincente, 79 Andarahy, Rio de Janeiro. Brazilio.

Por Nia Revuo

Por ke ĉiuj Flandraj Esperantistoj solidare kunlaboru kun nia aktiva prezidanto — Optimisto Fr. 15.—

Grupa Vivo

BRUSSEL — N.E.L.E.

Inter la 10 lernantoj de nia vintra kurso ni jam varbis 5 abonantojn por F. E. Ni nun klopodas varbi la novulojn por nia sekcio kaj daŭre propagandas inter ili por nia 8-a nacia kongreso.

Nia sekcio organizis kurson kun 8 partoprenantoj en junulara rondo, ĝin gvidas nia anino E. Sindhwad. La kurskotizo entenis duonjarabonon al F. E., tiel agante ni esperas pli facile kapti tiujn lernantojn por nia ligo.

La 25-an de Marto okazos en nia ejo kursfina festo, tiuokaze la anoj de sekcio Vilvoorde vizitos nin kaj interkonatiĝos kun la lernantoj de niaj du kursoj.

VILVOORDE VERDA STELO.

Op 18 Februari, ter gelegenheid van een gezellig samenzijn, waarop we het genoegen hadden de leden van de afdeling Brussel en ook den algemeenen bondvoorzitter in ons midden te tellen, werd de afdeling Vilvoorde gesticht.

Onze lesgeefster, S-anino Sindhwad, verklaarde zich bereid een daŭriga kurso voor de leden van onze nieuwe organisatie te leiden.

KORTRIJK.

Merkredo, 7-an de aprilo, monata kunveno, dum kiu estos lernataj la ĉefaj kantoj esperantistaj. Estis decidate ke ĉiun monaton okazus festvespero; la aliaj semajnoj estos dediĉataj al komuna studado de la gramatiko.

LEUVEN « LA NOVA TAGIGO ».

Nenio speciale okazis dum la pasinta monato rilate al la grupo, nur tio, ke la 15-an de Februaro aperis la unua numero de nia klubrevuo. Ĝi nomiĝas « Nova Tagigo » kiel la grupo kaj estas redaktata kaj eldonata de S-ro Cnops. Kvankam ĝi nur estas multobligita, ĝi tamen sufiĉe bone aspektas kaj ampleksas ses grandajn paĝojn. La enhavo nur iom rilatas al la klubo, ĝi pli celas esti interesa legajo por la klubanoj ol nura programo. La 16-an de Marto aperis la dua numero; oni do povas esperi ke ĝi daŭre aperados.

WIE ZICH NU ABONNEERT OP

FLANDRA ESPERANTISTO

Ontvangt het blad gratis tot 1 Juli

(begin van het bondsjaar 1937-38)

STORT HET BEDRAG (20.— FR.) OP REKENING :

No 232150 VAN FLANDRA LIGO ESPERANTISTA, BRUSSEL

Antaŭ kaj post la kongreso ni esperas eldoni specialajn numerojn : la unua kun la kompleta programo kaj ĉiuj dezirindaj sciigoj por la kongresanoj, la dua kun ampleksa raporto pri la kongreso.

Aliflanke en la grupo, la kurso por progresintoj iras tra ordinara vojo. Foje ĝi estas gvidata de S-ro Frantzen, foje de S-ro Cnops. Kvankam la ĉeesto ne estis tre vigla, ni tamen povas diri ke « Nova Tagiĝo » (La klubo) pli kaj pli bone laboras.

OUDENAARDE AL PACO.

Post longtempa dormado, ni vekigis kun novaj fortoj. Ni denove estas pretaj, kune batali sur la verda kampo.

La kunvenoj por la nuna monato sekvas ĉi-tie : la 6-an ni havos kantvesperon; la 13-an okazos perfektiga leciono kaj la 20-an ni tradukos historian verkon.


La geanoj estas petataj regule ĉeesti la kunvenojn, ĉar, malmultnombro kiel ni estas, ni devas vigle labori por retrovi la perditan tempon. Ni esperas ke la komencita Ĉe kurso alportos kelkajn novajn gemembrojn.

VICHTE.

Pasintan monaton la esperantista kerno kunvenis en la komunuma lernejo kaj fondis grupon kiu tuj aliĝis al Flandra Ligo. La dek-du membroj elektis prezidanton S-ron Gerard Favere, ĉefinstruisto kaj kiel sekretarion S-ron André Vandenberghe. Samtempe la membroj preparis la organizon kaj la propagandon de la nova Ĉsehkurso de Karolo Solc. Per persista laboro, ni esperas fari el Vichte — la plej malgranda vilaĝo el Flandra Esperantujo — unu el la plej viglaj centroj. Dum la monato Aprilo la prezidanto lernigos diversajn kantojn al la membroj partoprenontaj la kongreson en Leuven.

Angulo de la Sercemuloj

Problemo 22 — Krucvorto



- Hor. 1) Loko kie oni faras laktosupo. (R.). — Parto de jaro.
- 2) Certigi.
- 3) Birdloĝejo. (R.). — Akvosporto.
- 4) Glifilo. (R.). — Pronomo persona — Nacia esperanto movado. (mallong.).
- 5) Numeralo — Malnova ora monero (R.). — M. P.
- 6) Vorto (R.). — Hodiaŭ — Malgranda malbonodo-

ra mambesto (R.).

- 7) Frukta grajno el kiu oni faras likvoron (R.). — Ne restu staranta !
- 8) Indikanta la valoron de io per cifero diferenca je la efektiva valoro (R.).
- 9) Engluti fluidaĵojn (R) — Bildo.
Vert. 1) Vortspeco (R).
- 2) Tuj scii (R).
- 3) Persekuti bestojn — Oranĝruĝa plomba oksido (R).
- 4) Verbo esprimanta la ekziston (R). — Ilo por ĉirkaŭigi la talion.
- 5) Prepozicio — Certa persono — Marko (mallong.).
- 6) Operacii per nombroj.
- 7) Adverbo — Certa maniero — Pronomo persona.
- 8) Vazo (R) — Renomo (R).
- 9) Tropika grimpanta vegetaĵo (R) Kontraŭa.
- 10) Unu el dunaskito (R).
- 11) Ludo, kiu okazas ĉiun kvaran jaron.

Problemo 23.

LA RUZA KNABO

Janĉo iun tagon vizitis sian onklon. Li eniris la antaŭ-ĉambron, vidis en la salonon kaj poste eniris la kuirejon, sed trovis nek Onklon nek Onklinon. Tamen sur la tablo troviĝis 2 belaj pomoj, kiujn li tuj ekvidis. Eble vi ĉiuj memoros kiel alloge estas belaj pomoj por dekjara knabo. Ankaŭ nia Janĉo devis ege batali kontraŭ la forŝtelemo kiu enpenetris lian koron. Ĉu li venkis ? Tion mi demandas al la solvistoj. Notu tamen; ke li ne formanĝis la pomojn, eĉ ne tuŝis ilin, sed... ili ankaŭ ne restis. Kio do okazis ?

Ankaŭ neniu alia tuŝis la pomojn.

Por ĉiu problemo ni forlotos unu premion. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5-a de Majo 1937 rekte al S-ro F. Volders, Bredastraat, 94, Anwerpen.

PREMIOJ. Gajnis premion : S-ino Vande Ven kaj S-ro Cortvriendt.

Solvo de problemo 18. *Hor.* : Album — rampi — amikiĝi — aln — rem — rad — ide — ial — kristnaskiĝ — tir — bal — ar — legat — as — ben — met — alt.

Vert. : Ara — knab — lir — re — bandit — um — esil — mir — trem — kern — ge — rim — abat — aĝ — isat — mirakl — ali — al — ind — ĝust.

SOLVO DE PROBLEMO 19. La litero N.

Jarbatalon : M. V. D. Mast. — 53 P. — K. Pollet. — 53 P. — Sekvas kelkaj kun 50 P.

POR LA PACIENCAJ FRAŬLINOJ

Je propono de ia membro de nia Ligo, (kiu volas resti nekonata) mi organizas, sekvontan strangan vetbatalon.

Prenu kudrilon numeron 5 (nepre necesas ke vi uzu tiun numeron) kaj enmetu en ĝin (en la okulon kompreneble) kiel eble plej multe da fadenoj de kia ajn dikeco aŭ maldikeco. Kiu sukcesos enmeti la plej grandnombron, ricevos kiel premion 50 (kvindek) frankojn, donacita de la antaŭnomita sinjoro. Kompreneble ankaŭ la mal-kaj-senpaciencaj ulinoj kaj uloj rajtas partopreni al la batalo.

La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5-a de Majo rekte al S-ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenestraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, 22, Hamme (O. Vl.).
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap: 5 fr.; met maandblad: 25 fr.
Postchek: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50

AFDEELINGEN:

Aalst: « Pioniro ». Sekretariaat: Molenstraat, 30.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.
Blankenberge: « Norda Stelo ». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.
Kortrijk: « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
Leuven: « La Nova Tagiĝo ». Sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: « La Tagiĝo ». Sekretariaat: Wetstraat, 44.
Mechelen: « La Estonto ». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
Oostende: « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Peter Benoitstr., 27.
Oudenaarde: « Al Paco ». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Esperantista Grupo ». Hoogledesteenweg, 163-165
Tienen: « Zamenhofa Standardo ». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumplich.
Vichte: « Esperantista Grupo ». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.
Vilvoorde: « La Verda Stelo ». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
Zaventem: « Verda Standardo ». Sekretariaat: Heldenplaats, 115.

VERTEGENWOORDIGERS:

Aarschot: Van Winckel 'J., Fabriekstraat, 28.
Arendonk: De Troeyer A., Gasthuisstraat, 98.
Assche (Brab.): L. De Rop, Tenberg, 24.
Astene: M. Vanderlinden, Dorp, 54.
Deerlijk: Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.
Diksmuide: Mackelberg, IJzerlaan.
Gent: F-ino J. Terry, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.
Wilrijk: D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.
Woumen (W. Vl.): H. Verfaillie, Schrevelstraat.



EEN TAAL LEEREN IS INSPANNING
ESPERANTO LEEREN IS ONTSPANNING

DE INTERNATIONALE HULPTAAL
ESPERANTO kan door eenieder
aangeleerd worden op aangename
wijze, volgens rechtstreeksche methode,
met ons geïllustreerd leerboek,
bevattende 200 afbeeldingen, waar-
onder een aantal uit de bekende
Adamson-reeks.

Het boek wordt portvrij toegestuurd
mits storting van 12 fr. op postrekening
Nr 3268.51 van F.E.I.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

★

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversoj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

« Presejo Groote Centrale Drukkerijen », Kipdorpest, 26, Antwerpen.

“BREUGHEL”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Drinken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

St MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭajo
ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo
laŭnteno — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensio

N.B. - Elektita loko por ekskursaj celoj
Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES